


LA VERDA LUPEO




Informilo de ELF/AREK

Aŭgusto 2014

(46a jaro)

N-ro 166

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Stampo kaj pk SERVO PER AMIKECO - Trovita post 12 jaroj

Yang Yen-Nung, Volapukisto en AMOY/XIAMEN, Ĉinio

VEN-PU

Nomo de Teo-firmao

AMOY Hodiaŭ: **XIAMEN**

Ĉina havenurbo

TEDAMÄK (Volapük)

Varomarko

La du ideogramoj:

Ven Pu



Jam en nia LVL 140 eblas legi pri volapukaĵoj. Intertempe mi trovis pluajn detalojn pri volapukaĵoj, eldonitaj de tiu volapukisto Pietro Poletti. Do pri glumarkoj, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, kovertoj kaj „mondmono“. Pietro Poletti (1846-1915) venis ĉ. 1885 el Milano al Amoy (nun Xiamen) kaj laboris kelkajn jarojn en la tiea doganejo. Poste li estris teo-domon. 1902 (?) li transloĝiĝis al Shanghai. Li estis tre aktiva volapukisto kaj havis ampleksan korespondadon.



Eltondaĵo kun la du vpk-markoj
surstampita: AMOY kaj 95 5 16



Franazim = Frana (genitiva) = Franko,
zim = centono (centimo)
1 franko (inter du asteriskoj)

Ideogramo: dek mil
Koloro: „hel-ultramarinblua“



Franazims
zims (pluralo) = centimoj
25 centimoj (sen asteriskoj)

Ideogramo: ?
Koloro: ?

Mon bevünetik: Mono internacia

bevü = inter, net = nacio. Kun adjektiva formo: ik

Tiuj du markoj estas cititaj en spec. pm-katalogoj kaj en nuntempaj famaj
aŭkcioj kiel „lokaj privatpoŝtaj markoj“ (kun fantaziaj prezoj ĝis 200 eŭro)



Tiun ĉi volapukan sigelmarkon
de Yang Yen-Nung
antaŭ du-tri jaroj akiris unu el niaj
liganoj en aŭkcio de Gaertner
je sufiĉe suka prezo.

Mezuro: 16x20 mm, koloro ruĝa




VOLA MON = Monda mono?

LAFA ZIM = Duona franko?

Potamäks nulik ?

Koloro: Nigra sur ruĝa



Koresponda karto sendita 1897 de la volapukisto Sun Yu-fu el AMOY




Sendita 1898, kun algluita 1 Franazim-marko

„Mondo-monomarko“
kun teksto:

VRANA ZIMS 10

Sube: VOZIMS BALS



廿四崎頂

Supro de Dudek-kvar-ŝtupa Deklivo
malnova nomo de strato en Amoy (Xiamen)

文圃茶行

Ven pu Teo-firmao aŭ Te-domo

楊硯農

Yang Yen-nong aŭ Yang Yen-nung



Diplomo (n-ro 987)

**por
Söl Robert DIETZE
Dresden/Leipzig
kun subskribo de Schleyer**

(1897)

En la arkivo de d-ro Detlev BLANKE, Berlin

Esperanto – Lingvo de Amikeco La interlerneja konkurso en Lublin/PL 2013

Ĝi okazis sub la aŭspicio de la Poŝtoŭficejo Lublin.
Organizis ĝin la EK Lublin kune kun la Junulara Kulturdomo.

Partoprenis la gelernantoj de la elementaj lernejoj, de la gimnazio kaj la supera gimnazio en Lublin.

Plej bonaj verkoj:

Klaudia Kierozalska ... elementa lernejo

Aleksandra Błaszczak ... gimnazio

Adrianna Jabłońska ... supera gimnazio

Aleksandra Kawiecka ... supera gimnazio. Tiu ĉi karto estas iom pli valora, ĉar sur tiu ĉi karto kun blua bildo la poŝtoŭficisto faris eraron!

La poŝtoŭficejo eldonis kaj vendis la 4 kartojn kun po 600 ekzempleroj.




de Klaudia Kierozalska

Anna LASKOWSKA, ul. Pocztowa 2/2, 22-300 KRASNYSTAW; POLLANDO pretas sendi donace la kartojn al interesuloj.

Ni kore dankas al ŝi pro la senditaj informoj kaj poŝtkartoj!

La 15a E-bildkarto el Dresden



Eldonis ĝin la „E-Amikaro Dresden“ en februaro 2014. Ĝi montras portreton de Marie HANKEL, la ind. E-pm kun la „Kvaro por la Kvara 1908“ k.a. Interesuloj sin turnu al nia ligano d-ro W. Schwarz.



Foto de la inaŭguro de la 2014-sezono
11/12 04 2014

La Esperanto-Domo de Jacugatake 20 jaroj, 1994 – 2014

La jam 4a variaĵo de la Jacugatake-poŝtmarko aperis 11 04 2014
kun nominalo de 52 enoj (apenaŭ videbla en la originalo) memore al
„20 Jaroj de la Esperanto-Domo“.

Supre maldekstre en la marko videblas: 1994 2014

En la antaŭa (3a) eldono samloke videblas: 2013

La unua eldono aperas kun la nomo: Yatugatake

En la dua eldono videblas: Jacugatake ...

Detalojn pri la domo eblas ekscii per: http://www.geocities.jp/yatu_domo.

Ĝi estas administrata de la Japana Esperanto-Instituto.



La unua eldono kun: Yatugatake

La 62a kongreso de Kansajaj Esperantistoj en Himeji



La kastelo (burgo) de Himeji



La kongresa koverta kun kongresaj poŝtmarkoj,
kongresa kaj pejzaĝa poŝtstampoj de Himeji.



1 (82 enoj)



2 (52 enoj)



3 (82 enoj - granda)



4 (82 enoj)



5 (52 enoj)



6 (82 enoj - granda)

La individuaj poŝtmarkoj de la 62a Kongreso de Kansajaj E-istoj

Nia kluba amiko Haruja Maekaŭa iniciatis ind. memorigajn poŝtmarkojn por la ĉi-jara 62a kongreso de Esperantistoj en provinco Kansajo. Kompletigis la eldonon kongresaj memorkoverta kaj poŝtkarto kun la kongresa emblemo kaj kongresa poŝtstampo.

Jam du tagojn post la kongreso tiuj materialoj videblis en la reta aŭkcio **DELCAMPE** kun fiksa prezo de po 5.50 €. (Kov. aŭ pk kun stampita ind. pm)



Haruja Maekaŭa



Suzuoki Ziro

Koran dankon al Ziro Suzuoki kaj Haruja Maekaŭa pro la senditaj informoj.



Poŝta ekspo-stampo

Samideano M. Vihanto

La E-filatelisto Martti Vihanto en nacia ekspozicio „ABOEX 2014“


1918 *Esperanta Finnlando komencas*

Esperantolehti alkaa ilmestyä

A Finnish Esperanto periodical starts

Lehden päätoimittaja on vuosina 1918–74 filosofian maisteri Vilho Setälä (1892–1985). Lehden ilmestymisessä on katkoksia. Vilho Setälän isä Eemil Nestor Setälä (1864–1935) toimii Helsingin yliopiston suomen kielen ja kirjallisuuden professorina 1893–1929. Muistopostimerkki ilmestyy 27.2.1964 ja ensipäivänleimaus on syntymäpaikkakunnallaan Kokemäellä.

The card has been signed and sent by Vilho Setälä, a longtime editor-in-chief of the periodical and son of E. N. Setälä. FINNA FILOLOGO = a Finnish philologist.



En Turku / Abo,
Finnlando, okazis
en aprilo 2014 landa
filatela ekspozicio
kun pli ol 100 kolektoj.
Trovis lokon en ĝi
ankaŭ kolekto de
E-poŝtmarkoj en tre
bona aranĝo.
Vi povas rigardi ĝin en
la reto sub la adreso

<http://www.marttivihanto./fi/fi-phil.html>

Reĝa protekto de la 4a UK

(Artikolo de J. R. Piton germanlingve 2014 en retpaĝo de pk-aŭkciejo)

La kvara Universala Kongreso de Esperanto en Dresden, 15-a ĝis la 22-a de Aŭgusto 1908, akceptis 1368 partoprenantojn el 40 landoj.

En tia Universala Kongreso, kies serio komenciĝis en Francio (1905) kaj en 2014 havas sian 99-an okazon en Argentino, oni havas plenan semajnon kun prelegoj pri plej diversaj kulturaj, sciencaj kaj klerigaj temoj prezentataj en Esperanto.

La partoprenantoj de tiuj kongresoj havis kaj plu havas ankaŭ kulturajn spektaklojn pri loka kaj internacia arto.



La Kvaro por la Kvara.

La slogano estis oreľrapa: "Venu Dresdenon! - Koran Bonvenon". Kvaropo de germanaj aktivuloj estis antaŭ la organizado: kuracisto Eduard Mybs, poetino Marie Hankel, doktoro pri teologio Albert Schramm kaj bankisto Heinrich Arnhold. Ili konsistigis la "Kvaron por la Kvara".



La saksa reĝo Frederiko Aŭgusto la 3-a (1865-1932) akceptis la oficon de Alta Protektanto de la Kongreso kaj en tagĵurnalo de la 17-a oni legis lian bonvenigon al la kongresanoj. Dum la semajno de la aranĝo la urbo disponigis publikajn ejojn kaj faciligon de transportado al la kongresanoj.

Krom kelkaj teatraĵoj tra la semajno fare de amatoroj, la 19-an de aŭgusto 1908 okazis dum la kongreso ankaŭ la unua prezento de dramo en Esperanto fare de profesiaj aktoroj en la Dresdena Operdomo.


La dramon "Iphigenie auf Tauris" de Goethe tradukis la aŭtoro de Esperanto mem, L. L. Zamenhof, dum mallonga tempo antaŭ la Kongreso.

Partoprenis Emanuel Reicher (1849-1924) de la Lessing-teatro en Berlino, siatempe unu el la plej eminentaj aktoroj. Ankaŭ la aliaj rolantoj estis kapablaj profesiuloj, i.a. la filino de E. Reicher, Hedwig (1884–1971).

Ŝia vizaĝo estas i.a. videbla en statuo de Ifigenio sur la brakoj de bankisto Arnhold, en karikaturo de poŝtkarto eldonita de S. Farges (Francio, 1911). Produktiĝis porokaza poŝtkarto kun portreto de la reĝo kaj de la reĝa operdomo, kiel rememorigo pri tiu unua prezentado. Problemo en la kompostado de la titolo "Lia Majesta Moŝto, la Reĝo": anstataŭe aperis "Sua", kiu tute ne estas esperanta vorto. Koincide, la eraro estigis la precize korespondan vorton en la portugala. Portugala, kia cetere estis la patrino de la reĝo, Maria Anna (1843-1884), Princino de Braganza kaj Sachsen-Coburg kaj Gotha, Infantino de Portugalio.



Kofromarko



Salutkarto sendita el la 4a UK en Dresden 1908 kun la slogano
Venu Dresdenon
Koran bonvenon



IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por veturo per vaporŝipo al Wehlen Ĵaŭdo, 20^a de Aŭgusto. — Forveturo: 9^a matene. —	IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por fervoja veturo al Dresdeno — Forveturo 12^a nokte. —
IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por veturo per vaporŝipo al Meissen Mardo 18^a de Aŭgusto. — Forveturo 12⁰⁰ posttagmeze. —	IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por Rigardado de „Albrechtsburg“ en Meissen Mardo 18^a de Aŭgusto. — Komenco: 4^a posttagmeze. —
IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por la koncerto en la katedra preĝejo en Meissen Mardo 18^a de Aŭgusto. — Komenco: 6³⁰ vespere. —	IV. Internacia Esperantista Kongreso Dresdeno, 16—22^a de Aŭgusto 1908. Kupono por reveturo al Dresdeno Ĵaŭdo, 20^a de Aŭgusto.

La kuponaro de la kongresanino f-ino Frieda Barthel el Chemnitz







Laborista antaŭkongreso internacia Dresdeno 28 kaj 29 Julio 1921.

Bildkarto

de la Laborista antaŭkongreso internacia en Dresdeno, 1921



Poŝtkarto-tutaĵo kun dorsflanka surpriso de la informilo „Lasta Poŝto“.

Eldonis: Esp.-grupo de Barnaul, Sept. 1921

En ĝi informo pri la antaŭkongreso de laboristaj E-istoj en Dresden 1921, pri la helpkampanjo por la malsatantoj en apudvolga regiono kaj pri la XIIIa UK en Praha.

Sur la bildkarto de la kongreso (supre) videblas i.a. Lanti, Paul Rauschenbach (Chemnitz) kaj Richard Lerchner (Leipzig).

E-medaloj el Herzberg/Harz

Nia ligano Peter Zilvar, Herzberg, sendis sekvajn informojn pri aperintaj E-temaj medaloj.

2008 Kastelo Herzberg 276 gramoj

2009 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof 355 gramoj

2013 Jubileo Gora/Herzberg 315 gramoj

2013 Joachim Giessner 355 gramoj

Medalisto: Peter Götz Güttler, Dresden


Diametro: 11,2 cm Materialo: bronzo

Reverso por ĉiuj la sama

J. Giessner

Reverso



Kastelo Herzberg



Zamenhof 150-a naskiĝtago

Gora - Herzberg





Novaĵoj de IPA (2014)

Germana Poŝto eldonis je privata mendo denove du pm-ojn kun la emblemo de IPA kun la slogano

en Esperanto: SERVO PER AMIKECO.

Krome aperis t.n. „Plusletero“ kun surprisita 60-cenda poŝtmarko.

Do, temas pri „koverto-tutaĵo“. La informojn ni ricevis de la prezidanto de la „Internacia Esplorgrupo Policfilatelo“, (Laborgrupo en la germana Filatelista Ligo).

Li ankaŭ sciigis pri du memorkartoj el Pollando pri „10 jaroj de IPA-sekcio en regiono Plock.

Unu el ili kun la E-lingva blazono de IPA. La dua montras la fondinton Troop. Estis li, kiu enkondukis la E-lingvan devizon de IPA: Servo per amikeco!

Ambaŭ kartoj montras la porokazan stampon de poŝtejo en Plock kun la devizo. Tiu poŝta stampo sin kaŝis ekde la 04 10 2002! Post pli ol 12 jaroj ni tamen trovis ĝin.

En la decembra LVL ni raportos pri aŭstra ipm aperinta okaze de la 15a nacia IPA-kongreso en Vieno, 1.-5. Junio 2005. Ankaŭ ĝi posedas la IPA-sloganon. Koran dankon al sinjoro Deitrich pro la senditaj informoj!



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

ATENTU! Via kotizo! Ne plu ekzistas nia bank-konto en Germanio.

Jen nia bankokonto: IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – BancoPosta

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

La Klubo de Amikoj de Esperanto en Svitavy (CZ)

kun la loka klubo de filatelistoj aranĝas regionan filatelan ekspozicion kun aparta „Esperanto-salono“ en Svitavy, 25-28.9.2014. La organiza komitato kreis tre interesan paĝaron en la ĉeĥa kaj Esperanto: www.svitavy2014.estranky.cz Samideanino Libuše Dvoráková, kiu estas membro de la organiza komitato, varme invitas al partopreno.

Ekspozicio „Filatelo & Esperanto“ en Herzberg-a Kastelo, 2014

La Esperantoklubo en la germana urbo Herzberg (Harz-Montaro) en oktobro 2014 prezentos E-filatelan ekspozicion en la kastelo de Herzberg. Oni montros materialon el la ampleksa arkivo de la grupo.

Nia ELF/AREK-poŝtmarko

ankoraŭ estas havebla ĉe nia prezidantino.

Koran dankon al ĉiuj kunlaborantoj de tiu ĉi LVL

Aparte mi dankas al nia Elda Doerfler kaj al Pino.

Ili multobligis kaj ekspedis nian LVL.

Amikajn salutojn de via redaktoro Rudolf Burmeister